



2021-08-13

Raporto pri agadplano de la Estraro surbaze de la rekomendoj subtenataj de la Komitato por la financa resanigo de UEA

[KONFIDENCA ĝis traktado kun la Komitato en aŭgusto 2021]

Enkonduko

La 5-an de septembro 2020, laŭ la [protokolo](#) de sia Ĝenerala Kunveno, la Komitato de UEA subtenis la jenajn 5 proponojn:

- 1) *konsideri, ke pli da laborfortoj estonte laboru ekster Nederlando;*
- 2) *daŭrigi la klopodojn por administra modernigo;*
- 3) *(fari) esplorojn por ludoni la tutan sidejan domon aŭ parton de ĝi;*
- 4) *daŭrigi la esplorojn pri estonteco de Biblioteko Hodler laŭ la opinioj protokolitaj;*
- 5) *(fari) plenan esploron kaj konsideron de la avantaĝoj de estonta ŝanĝo de la Libroservo al loko ekster Nederlando.*

Krom tio, la 24-an de oktobro, laŭ la sama protokolo, la Komitato ankaŭ petis:

- 6) *de la Komisiono pri Financo rekomendojn kaj gvidliniojn pri investopolitiko kaj klarigo pri efika kaj rapida decidprocedo pri investado;*
- 7) *de la Estraro proponi gvidliniojn pri subvencipetado kaj kun profesia helpo daŭrigi esploron pri subvencioj kaj subvencipeti. UEA aparte strebu engaĝi ankaŭ Landajn kaj Fakajn Asociojn en tiaj projektoj.*

Tiu ĉi raporto prezentas la agadplanon de la Estraro de UEA, kiu spegulas tiujn 7 punktojn kaj ankaŭ la [rekomendojn](#) de la Komisiono pri Financo. Ĝi havas 3 partojn: la du unuaj partoj traktas la punktojn 7 (subvencipetado) kaj 6 (investado); la tria, ĉefa parto, kunigas la punktojn 1 ĝis 5, ĉar ili grupe tuŝas laborfakojn de la Centra Oficejo (CO).

Strukturo de la raporto

Subvencipetado	2
Investado	2
Centra Oficejo (CO)	5
3.1. Serĉo pri oportunoj por laborfortoj ekster Nederlando	5
3.1.1. Pri la Kongresa Fako	6
3.1.2. Pri la Libroservo	8
3.2. Modernigo de administrado	9
3.3. Disponigo de la sideja domo	10
3.4. Biblioteko Hector Hodler (BHH)	10
Konkludoj kaj resumo	11
ANEKSE: Resuma raporto pri la komitata enketilo rilate investopolitikon	13



1. Subvencipetado

Lige kun specifa rekomendo de la Komisiono pri Financoj komisiis subvencipetadon, poste subtenita de la tuta Komitato, inter aŭgusto kaj oktobro 2020 okazis provo akiri subvencion el eŭropaj instancoj, cele al la 106-a Universala Kongreso (UK) en Belfasto, per la programo CITIZ - Europe for Citizens, Ago CIV - Strand 2.3: Civil Society Projects. Temis pri dua provo (la unua okazis en 2019), ambaŭ kunlabore kun la sendependa grupo Pangee, bazita en Francio. Bedaŭrinde sen sukcesoj.

Antaŭe, en aprilo 2020 ankaŭ estis klopodo sendi projekton por subvencio el la Eŭropa Kultura Fondaĵo, sed, pro nematureco de la projekto, estis decido retiri ĝin.

En aŭgusto 2020 la Estraro decidis por pli efektiva kaj strukturigita agado pere de kontrakto kun Kosmo Strategio. Laŭ la kontrakto, diskutita inter aŭgusto kaj oktobro, Kosmo konsilas al UEA pri subvencipetado kaj subvencipetas nome de la Asocio. En novembro 2020 UEA subskribis la kontrakton kun Kosmo. La decido okazis dum transiro de la antaŭa programo al la nova programo Erasmus+ 2021-2027 de Eŭropa Unio, kies [unua laborprogramo](#) lanĉiĝis nur fine de marto 2021.

Kunlabore kun Kosmo UEA organizis la unuan kunsidon de la serio “[De ideoj al agado](#)”, en februaro 2021, kiu arigis landajn kaj fakajn asociojn de UEA bazitajn en Eŭropo por komuna diskuto por ideoj pri kio subvencipeti. Tio tre spegulis la deziron de la Komitato. Kosmo ankoraŭ okazigis [duan kunsidon](#) en aprilo 2021. Fine, jam en majo 2021, unua limdato de la menciita laborprogramo de Erasmus+, disendiĝis la unuaj subvencipetoj nome de UEA kaj partnere kun aliĝintaj asocioj.

Por la sama limdato UEA ankaŭ kunlaboris kun E@I kiel partnero en du aliaj subvencipetoj. La rezultoj ankoraŭ ne estis publikigitaj. Kun Kosmo la Estraro atentis pri novaj ebloj kadre de Erasmus+.

Ekster la kadro de Erasmus+, en 2020 UEA pere de la Ĝenerala Direktoro, post sugesto de la Komisiono pri Financo, UEA memstare petis subvencion al la nederlanda ŝtato kadre de speciala programo por organizaĵoj kaj entreprenoj suferintaj enspezoperdon pro la pandemio. De tio UEA ricevis 29 486 €, kiel informas la [Jarraporto de 2020](#). La Ĝenerala Direktoro laboras por simila agado en 2021, ankoraŭ sen raportebla prognozo pri la fina rezulto de tiu subvencipeto.

La Estraro dume daŭrigos en tiu vojo pri subvencipetado, tio estas, kunlaborante kun diversaj instancoj, celante diversajn fondusojn, ĝis venas la rezultoj de la nunaj agadoj. Novaj aliroj povas laŭeble okazi kaj la Komitato estos informita.

2. Investado

En la lastaj jardekoj la investo-agado de UEA tradicie okazis kaj okazas ĉefe pere de financaj rilatoj kun la banko ABN AMRO de Nederlando kun pagata konsilservo. En maloftaj okazoj la Asocio investis en nemoveblaĵo (laste per aĉeto de la Volontula Domo en 2016, kio montriĝis trafa elekto). En tiu ĉi sekcio de la raporto la Estraro informas pri lastaj agoj por investado kaj faras rekomendojn.

Dum la jaro, kaj ankoraŭ nun, la Prezidanto de UEA rekte rilatis kun komitatanoj por sondi en la Komitato opiniojn pri investado, ĉefe rilate risko-toleremon (vidu la [raporton anekse](#)). La risko-profilo de UEA en la menciita banko estas “modere defenda”, kio estas akceptebla por neprofito-cela organizo, sed nuntempe nesufiĉa por la bezonoj de UEA. En 2019 estis prezentita al la banko kiel celon la jenan defion: konservadon de riĉeco (reala valoro, inkluzive de inflacia korekto) kun plusaj investaj redonoj por kovri la jaran buĝetan deficiton de 80-90 000 EUR. La investa horizonto informita de la banko por tio estis “longa, almenaŭ 25 jaroj”. La banko aldonis: “Pri la asigno en



obligacioj pli frue estis dirite, ke investoj povas esti faritaj nur en altkvalita investa papero” (kio limigas la aferon).

La jaro 2020 estis aparte malfavora pro la pandemio. Ankaŭ estis necese studi la limigojn, kiuj povas okazi pro la leĝaj rilatoj inter Nederlando kaj aliaj landoj. Pro tia limigo rilate Usonon, la Prezidanto de UEA, D. Charters, ne povis respondeci pri la banka rilato kun ABN AMRO. Estis necese formale delegi tion al alia estrarano. Estis decidite, ke li delegus tion al la Vicprezidanto, F. Maia Jr. (Brazilo), kaj al la Ĝenerala Sekretario, A. Kadar (Francio). Kvankam la 2-a Vicprezidanto, Trezoro (Ĉinio), respondecas pri Financoj, ne estis rekomendita delego de tiu respondeco al li. La Estraro rekomendas al la Elekta Komisiono dum propono de venontaj estraroj, ke inter la Prezidanto, vicprezidantoj kaj Ĝenerala Sekretario troviĝu almenaŭ du civitanoj, kiuj ne suferas limigojn rilate bankajn rilatojn kun Nederlando (listigi la landojn, kiuj tion suferas, ankoraŭ estas farota tasko, ne nepre de la Estraro). Tion traktinte, post formalaj ŝanĝoj ĉe la banko respondecas pri la rilatoj kun ABN AMRO F. Maia Jr. A. Kadar kaj M. Schäffer, kun asisto de R. Schmeits.

Post la formala ŝanĝo okazis pluraj kunsidoj kaj interŝanĝoj kun la banko. Pri la investaj ŝancoj ĉe alt-interrezaj obligacioj ABN AMRO konsilas al siaj klientoj (se tio kongruas kun ilia riska percepto) ankaŭ investi en alt-interrezaj obligacioj (sed tio ligiĝas al alta risko). Tamen kialoj laŭ la banko por tion fari estas:

- a. Interezoj de la obligaciaj merkatoj ŝajne atingis sian “fundon”, kaj la banko atendas, ke ili kreskos (malrapide) en la venontaj kelkaj jaroj;
- b. La (pli) alta interezo kaj pli mallonga (ol averaĝe) daŭro de ĉi tiaj obligacioj ofertas iom da protekto;

En la “modere defenda” risko-profilo ABN AMRO konsilis investi ĉirkaŭ 13% de la totala obligacia asigno en alt-interrezaj obligacioj. En la kazo de UEA tio signifis investon de ĉirkaŭ 30 000 EUR al tiaj paperoj. Tiam (majo 2021) la preferata fonduso de la banko por tio estis la Fonduso ABN AMRO Candriam Global Sustainable High Yield Bonds Fund - EUR-hedged (distributing) - ĝi estas adaptita varianto de la Fonduso Candriam SRI Bond Global High Yield Fund - EUR-hedged (accumulating). La adapto estas ĉe pli malalta daŭra kosto en la fonduso kaj malsama aro de daŭripovaj parametroj, kiu pli taŭgas laŭ la daŭripova politiko de ABN AMRO. Por informoj pri la Candriam-fonduso mem oni povas vidi: <https://www.candriam.nl/en/private/fund-details/LU1644441716>. La enira kaj elira kotizo ne estos ŝargita al UEA, ĉar la fonduso estas distribuita de ABN AMRO (UEA povus same aĉeti tiujn paperojn per la borso, tamen kun risko pri ŝargo pro la enira kaj elira kotizo). La prezo de la Fonduso ABN AMRO Candriam Global Sustainable High Yield Bonds Fund - EUR-kovrita tiutempe estis 111,23 EUR. Ĝi ne pagis ĝis nun, pro la lastatempa dato. La ‘fratina’ fonduso de Candriam havas indikitan interezon de 4,6%. La respondeculoj do decidis akcepti la rekomendon kaj investi ĝis la limo de 30 000 EŬR por LU2041743779 - ABN AMRO Candriam Global Sustainable - High Yield Bonds Fund - EUR-hedged (distributing).

Grava okazo en 2021 estis la ŝanĝo de reguloj por kontanta mono en la banko, laŭ kio sumoj super 150 000 EUR estas ŝargitaj ekde la 1-a de julio kun negativa intereza procento de 0,50%. Tio estas normala regulo en Eŭropo kaj la disdivido de la mono al diversaj bankoj kreskigus la administrajn laborojn kaj ne kompensus la negativan renton. Necesas investi la monon. La banko informas, ke por klientoj en konsila servo kun la banko ili ofertas kompenson, kiu ĝis la fino de la jaro konsistas el 25% de la trimonata konsila kotizo, de maksimume 2 950 EUR.

La banko konsilas al UEA:

1. Havi klaran bildon de niaj totalaj (likvaj) aktivaĵoj. Rezervi sumon, kiun ni bezonas ene de du/tri jaroj. La ceteron investi; decidi ĉu ni volas investi ĉion aŭ nur parton;




2. Decidi pri via investa celo: (riĉeco-konservado, riĉeco-kreskigo, enspezoj ktp);
3. Difini nian investan horizonton (la periodon, kiam ni ne bezonas la investitajn aktivaĵojn);
4. Pridecidi nian riskan “apetiton”;
5. Surbaze de 2-4 elekti risko-profilon (vidu bildon donitan de la banko sube, en la angla);
6. Elekti kiel ni volas investi:
 - a. “papera administrado” (plenumita de ABN AMRO). Informojn pri la diversaj “mandatoj” ĉe <https://www.abnamro.nl/en/privatebanking/investments/portfolio-management/index.html> kaj en bildo donita de la banko sube, en la angla);
 - b. “konsila servo”: ABN AMRO konsilas, ni decidias;
 - ĉ. memdirektita investado (sen konsila kaj “zorga devo” de la banko).

Risk profile name	Very Defensive	Defensive	Moderately Defensive	Moderately Offensive	Offensive	Very Offensive
Investment horizon	> 2 years	> 5 years	> 7 years	> 10 years	> 12 years	> 15 years
Expected gross returns annualised (geometric return based on 10-year horizon)	0,1%	1,4%	2,3%	3,4%	4,4%	4,8%
Expected risk (standard deviation)	6,5%	7,4%	9,1%	12,0%	15,2%	17,4%
Probability of a negative return every ... years	2,0	2,4	2,5	2,6	2,6	2,6
Bandwidth (minimum and maximum weightings)						
Equities	0 - 10%	0 - 35%	10 - 55%	20 - 75%	30 - 95%	40 - 100%
Fixed income	40 - 100%	30 - 85%	20 - 70%	10 - 55%	0 - 40%	0 - 25%
Alternative investments	0 - 10%	0 - 20%	0 - 20%	0 - 30%	0 - 30%	0 - 30%
Liquidities	0 - 60%	0 - 70%	0 - 70%	0 - 70%	0 - 70%	0 - 60%
Neutral asset allocation						
Equities	0%	20%	35%	55%	75%	90%
Fixed income	90%	70%	55%	35%	15%	0%
Alternative investments	0%	0%	0%	0%	0%	0%
Liquidities	10%	10%	10%	10%	10%	10%

* The annualised expected gross return has been calculated based on the bank's long-term perspective (10-year horizon). For each risk profile, the neutral weighting has been assumed for each asset class. The higher the standard deviation, the higher the chance of a positive or negative return.
The value of your investments can fluctuate. Past performance is no guarantee of future performance



A: Managed for you B: Manage together with investment advisor C: Manage your portfolio by yourself.



Ekzemplo pri diferenco inter risko-profilo kaj risko-apetito jenaj. Nia celo estas konservado de riĉeco:



inflacio estas 1,5%, kostoj estas (proksimume) 0,8%. Do ni bezonas ĉi-kaze 2,3%-an redonon. Tio respondas al la modere defenda risiko-profilo. Sed ĉu ĝi kongruas kun nia risiko-apetito?

Pri tiu temo la Komisiono pri Financo identigis esperantiston, kiu pretas eniri la komisionon por helpi la Asocion pri tiu temo. Temas pri Garry Evans (Kanado), kiu profesie laboras ĉe BCA Research, unu el la plej grandaj sendependaj esploraj firmaoj pri ekonomio kaj investado, kiel konsilanto pri investado por diversaj investaj institucioj (universitataj fondusoj, pensiofondusoj, privataj bankoj ktp.) tra la mondo. Antaŭe li faris pli malpli la saman laboron dum 17 jaroj por HSBC, unu el la plej grandaj bankoj en la mondo. G. Evans estas relative nova esperantisto (ekde 2014), sed sufiĉe konata, ĉar estas kasisto de la montreala Loka Kongresa Komitato (LKK), kaj estrarano de la Esperanto-Societo Kebekia kaj de la Kanada Esperanto-Asocio.

Surbaze de tio la Estraro proponas:

1. Al la Komitato nomumi G. Evans kiel membron de la Komisiono pri Financo, por ke li ekaktivu kiel konsilanto de la Estraro kaj de la Ĝenerala Direktoro, krom de la Komisiono pri Financo mem, pri la temo;
2. Investa celo ne devas esti riĉeco-konservado, sed riĉeco-kreskigo (ĉar la kapitalo de UEA estis formanĝita dum la lastaj jardekoj) plus enspezoj;
3. Post la nomumo de G. Evans, difini nian investan horizonton kaj pridecidi nian riskan "apetiton";
4. Pri tio esti malferma ŝanĝi la risiko-profilon de modere defenda al modere agresema, se necese;
5. Almenaŭ parton de la investota mono investi laŭ la modelo "A" de ABN AMRO (la banko administras), ĉar tio parte malŝarĝas la Asocion (pluraj NRO-oj elektas tiun modelon).
6. Parton investi en nemoveblaĵoj (ĉefe en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj).

La Estraro, la Ĝenerala Direktoro kaj la Komisiono pri Financo esploras pri ebloj kaj tenos la Komitaton informita. Ĉiu agado pri investado okazas sub la Statuto ene de la kompetenteco de la Estraro, laŭ kio: "art. 52. Asocia Kapitalo: (...) La Estraro decidas pri uzo aŭ investo de la kapitalo; ĝi rajtas elekti specialan administranton".

3. Centra Oficejo (CO)

La unuaj 5 punktoj de tiu agadplano, subtenitaj de la Komitato, tuŝas: 1) ekhavon de laborfortoj ekster Nederlando; 2) modernigon de administrado; 3) disponigon de la sideja domo; 4) plibonigon de la situacio de Biblioteko Hector Hodler; kaj 5) ŝanĝon de la Libroservo al loko ekster Nederlando. Tiuj punktoj rekte tuŝas la Centran Oficejon (CO), ĉar al ĝi ĝis nun ligiĝas la menciitaj oficistaj laborfakoj kaj ĝi gastigas la Bibliotekon Hector Hodler.

3.1. Serĉo pri oportunoj por laborfortoj ekster Nederlando

La Centra Oficejo (CO) de UEA ekde 1955 troviĝas en Nederlando (Roterdamo). Unue, de la fondiĝo de UEA en 1908 ĝis 1947, ĝi troviĝis en Svislando (Ĝenevo; en iu periodo ankaŭ en Berno). Poste, inter 1947 kaj 1955, en Britio (Londono, ĉe du malsamaj adresoj dum tiu periodo). En Nederlando, post ses jaroj en luita domo, en 1961 la Asocio aĉetis propran domon ĉe Nieuwe Binnenweg 176 (NB176), kiun ĝi renovigis kaj pligrandigis en 1985-86 kaj 2005-08. La celo de la CO estas proponi la ĉefajn servojn de UEA al membroj, kiel la ekspedadon de revuoj, organizadon de la Universalaj Kongresoj kaj Libroservon, krom administri la Asocion kaj helpi zorgi pri la financoj. Antaŭe la CO gastigis eĉ la redaktoron de la revuo Esperanto, sed dum la jaroj la aferoj ŝanĝiĝis. En la du pasintaj jardekoj okazis ekŝiĝoj, ekŝigoj, dungoj, redungoj, emeritiĝoj kaj movoj de laborfakoj ekster la CO-on. Entute la CO havas dinamikan historion, kaj la ŝanĝoj kaj adaptiĝoj ĉirkaŭ la kunteksto, kiujn UEA travivis kaj travivas, estas parto de tio.



Pri tio la plej lastaj ŝanĝoj okazis en la lastaj 6 jaroj. Unu ĝenerala direktoro emeritiĝis inter 2015-2016; dungiĝis nova direktoro, kiu tamen ekŝiĝis inter 2017-2018; fine nova direktoro estis dungita por deĵori ekde 2018. Gravaj rimarkoj de tiu dungo estas: 1) la plej nova direktoro estis dungita kun la plej malalta salajro inter la tiama oficistaro de UEA (sub la ekvivalenta plentempa salajro de la tiama purigistino); kaj 2) li ne estis dungita por deĵori en la CO. Tiu realeco de dedistanca laborado ne estis tute nova en UEA, ĉar jam jardeko antaŭe la redaktoroj de la revuo Esperanto komencis deĵori ekster la CO kaj same okazas la tenado de la retejo de UEA (kvankam tiuokaze ne temas pri centraj postenoj, kiel tiu de direktoro). Tiu dedistanca laborado levis dubon, ĉu la laboro povus plenumiĝi laŭ tiu modelo, kvazaŭ la ĉeesto de ĉefo garantias la kvaliton de la laboro. Kvankam dehejma aŭ dedistanca laborado ne estas novaĵo kaj plene funkciis inter teamoj de internaciskalaj kompanioj, en la nuna epoko tia diskuto jam estas plene malaktuala, ĉar pro la pandemio la plej grandaj kompanioj de la mondo permanente adoptas dehejman aŭ dedistancon laboradon (plene aŭ hibride) kaj montriĝas, ke iliaj sukcesoj dependas ne de ĉeesto de ĉefo, sed precipe de la preteco de ĉiuj laboristoj kontribui al la sukceso. En UEA ekzemplo de lastatempa internaciskala kunlaboro estis la reta agado de la Asocio, kiu respondecas pri la okazigo de la Monda Festivalo de Esperanto, la Virtualaj Kongresoj, la virtualaj Malfermaj Tagoj, la revivigo de la jutubkanalo UEA viva kaj la retejo EventaServo.org i.a., ĉio dedistance (kaj dehejme). Tial la Estraro reliefigas la plenan oportunecon de la rekomendo de la Komisiono pri Financo subtenata de la Komitato movi laborfakojn ekster Nederlando.

La nuntempaj kunlaborantoj en la CO-strukturo estas la Ĝenerala Direktoro kaj aliaj dungitoj de UEA (oficistoj): <https://uea.org/asocio/kunlaborantoj>. Volontuloj (kompensitaj aŭ ne, en kaj ekster Nederlando) kaj partnereco kun TEJO helpas en la laboro. La Estraro kunlabore kun la Komisiono pri Financo identigis, ke el la nuntempaj laborfakoj ĉefe du devas moviĝi ekster Nederlando cele al daŭripovigo de la financa situacio de UEA: la Kongresa Fakoj kaj la Libroservo. Tiusence okazis esploroj kaj interŝanĝo pri ebloj ĉe kelkaj landoj, inter ili menciindas Pollando kaj Slovakio; kaj ekster Eŭropo, Brazilo, Ĉinio kaj Kolombio. La esploritaj aspektoj estis ĉefe la pozitivaj financaj kaj kvalitaj influoj, kiujn tiuj movoj portos al la Asocio nepre en mallonga tempospaco.

3.1.1. Pri la Kongresa Fakoj

Pri la movo de la Kongresa Fakoj ekster Nederlando la Estraro uzos la okazon ankaŭ por restrukturi la fakojn kaj tiel regule kontrakti kun profesia grupo por la okazigo de la diversaj eldonoj de la Universala Kongreso (UK). Per tio eblas al UEA ekhavi la kunlaboron de kvalita profesia teamo kontraŭ signife malpli alta kosto, kio respondas al la decido de la Komitato por financa daŭripovigo.

Laŭ la nuna esploro la grupo plej indikita por plenumi la taskojn de la Kongresa Fakoj estas Edukado@Interreto (E@I) en Slovakio. Montriĝis, ke nuntempe ne ekzistas alia konkurence samnivela grupo por tiu celo. La identigita grupo (i) laboras per Esperanto (kion ne plenumas aliaj grupoj ekster Esperantujo); (ii) havas unikajn spertojn en organizado de plurspecaj Esperanto-eventoj (inkluzive de UK) dum la lastaj 15 jaroj kaj (iii) plenumas ĉiujn bezonojn pri moderna aliro (de teknika kaj administra perspektivo) por tiucela organizado.

La graveco de la preteco labori per Esperanto, pri kio diferencas E@I de neesperantistaj grupoj, estas memevidenta, sed estas aparte grava la scio kaj sperto pri organizado de Esperanto-eventoj sufiĉe diversaj inter si. E@I organizis la 101-an UK-on en 2016, Nitro, kaj ankaŭ plurdekojn da aliaj internaciaj eventoj dum la lastaj 15 jaroj, inter ili SES (por progresado kaj kleriĝo pri Esperanto); SEP (por programado por kreo de teknikaj rimedoj al Esperantujo, sed ne nur), KAEST (por teknika kaj scienca apliko de Esperanto) kaj Poliglota Kunveno (en kiu Esperanto ĝuas grandegan reklamecon). La kontrakto kun E@I por organizado de UK-oj kaŭzos ne nur, ke la UK-oj profitas de la sperto organizi la menciitajn eventojn, sed la UK-oj ankaŭ gajnos regulan reklamecon kaj reprezentigon en



tiuj kaj aliaj eventoj (efektive ĝis nun la Kongresa Fako de UEA kutime ne reprezentigas nek partoprenas en aliaj eventoj, kio malfortigas reklamadon kaj aktualigon de la UK-oj). Aldoniĝas, ke ĉiuj tiuj menciitaj eventoj ekhavis siajn retajn versiojn dum la pandemio, kaj de tiu sperto jam profitis ankaŭ la UK-oj en la formato de la Virtualaj Kongresoj (VK).

Bazaj principoj de kontrakto kun profesia grupo por plenumi la taskojn de la Kongresa Fako estas, ke la kongresoj laŭ sia ĝenerala koncepto kaj graveco por la Esperanto-movado funkcios plene kiel ĝis nun, sub a rego de UEA, pri kiuj statute kaj regulare respondecas la Estraro, la Ĝenerala Direktoro kaj la Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK). La kontraktota organizaĵo do estos la plenumanto de taskoj por la realigo de la servo, kiu eksplicite plu okazos kiel servo de UEA kiel priskribita en la Statuto. La kontraktotoj povos aktivi por konsilado, scidono kaj subtenado, sed fine pri la baza strukturo, aspektoj, temo, loko ktp. laŭkoncerne decidados UEA (Estraro kaj/aŭ Ĝenerala Direktoro kaj/aŭ LKK).

La nuntempa rekta elspezo de UEA pro la UK speguliĝas en la asociaj buĝetoj, ĉe la rubriko Kongresoj & Turismo/Kotizoprocentaĵo, kiu difiniĝas surbaze de la kongresa regularo, laŭ kiu "35% [de la kongreskotizo iras] al la ĝenerala kaso de UEA, el kio oni financas la salajrokostojn de la kongresa administrado en la CO". Ekde 2018, kiam la Komitato taskis la Estraron redukti la konstantajn deficitajn, la prognozoj ĉe tiu rubriko reduktiĝis al siaj plej minimumaj tavoloj necesaj por kovri la kongresan administradon, lastatempe inter 55 000 kaj 42 000 EUR (buĝetoj de 2019, 2020 kaj 2021).

Por la restrukturigo de la Kongresa Fako ekster Nederlando, subtenate de la Komisiono pri Financo kaj en konsulto kun la Ĝenerala Direktoro, laŭ tiu modelo de kontrakto kun profesia grupo, la Estraro internegocis kun la kontraktota organizaĵo, ke la plenumo de la taskoj por okazigo de la UK okazos kontraŭ unua baza pago de 25 000 EUR plus komplementa partopreno en la rezultoj de la UK difinita surbaze de procentaĵo el 35% de la kongresa sumo pro kongreskotizoj. La fintrakto estas, ke la partopreno varios laŭŝtupo de 0% ĝis maks. 60%, depende de la kvantoj da efektive kongreskotizintaj partoprenantoj. Laŭ la nuna trakto, kiel ekzemplo, por UK kun ĉ. 1000 pagintaj partoprenantoj (averaĝo de la lastaj 10 jaroj) la aldona pago ne devos trapasi la sumon de 7000 EUR (do en tiu kazo tuta rekta elspezo pro la Kongresa Fako estus 32 000 EUR, ankoraŭ sufiĉe malpli rilate la nunan praktikon). Tiu aldona pago uziĝos deflanke de la kontraktota partio por dungi aldonajn portempajn laborantojn, ĉefe okaze de grandaj kongresoj, do ĝi ne signifas netan gajnon por la kontraktota partio kaj signifas malŝarĝon pri aldonaj dungoj pro la UK deflanke de UEA.

Tiu ĉi financa plano por la Kongresa Fako havas la jenajn avantaĝojn: UEA havos kiel fiksan jaran elspezon pro la UK sumon de 25 000 EUR, por havigi al si teamon; la aldona partopreno en la 35% estas instigilo tia, kia antaŭvidita en la bonaj praktikoj de projektmastrumado, laŭ kiuj la taskita teamo laboru por kiel plej eble sukcesa rezulto (kaj tia instigmetodo daŭre tenas la aferon finance pli avantaĝa kompare kun la nuntempa situacio); pro tio la prezentita plano antaŭvidas, ke ĉiu kongreso jam ekde 600 aliĝintoj povos esti rezultodona al UEA, kompare kun la nuna situacio, kiam por la unua pozitiva rezulto (t.e. plenumi la buĝetitajn atendatajn enspezojn pro kotizoprocentaĵo) bezonatas pli ol 1000 kotizintoj. Laŭ la prognozoj la gajno por UEA ekde 600 kongreskotizintoj estos pli alta ol ĝi estis ĝis nun, samkiel la minuso ĉe eta kongreso estos signife pli malgranda.

Surbaze de tio la kontraktota grupo estos taskita de UEA (Estraro kaj Ĝenerala Direktoro) por prizorgi la kongresojn kaj garantii kiel plej eble kvalitajn UK-ojn. Aldonaj avantaĝoj de tiu restrukturigo estos: (i) okaze de estonta malebligo de ĉeesta UK, la grupo ne nur teknike, sed ankaŭ organize prizorgos la funkciigon de la anstataŭa VK sen aldona kosto al UEA (en 2020 kaj 2021 la Estraro devis sola surprizi la konceptadon kaj organizadon de la VK); (ii) laŭ tiu proponata modelo ne unu homo, sed teamo laboros por la UK: dum la UK devos zorgi pri la diversaj taskoj pluraj personoj, kies dungon la kontraktota partio devos mem prizorgi kaj kio rapidigos solvado de problemoj dum la kongreso; (iii) pro tio, ke E@I estas sperta pri akiro de volontuloj el eksteraj



instancoj, interkonsente kun la Estraro la UK povos kalkuli je kompensitaj volontuloj, se ili okazas en regiono, kiu ebligas tion (ekz-e Eŭropa Unio kaj ene de landoj, kun specifaj tiucelaj programoj) - uzo de volontulaj programoj povas venigi al la UK dekojn da volontuloj, kiuj povas helpi ne nur dum UK mem, sed ankaŭ antaŭ kaj post la UK, inkluzive kiel fortoj de UEA por flankaj eventoj de la UK, se ili okazos proksime (ekz-e ILEI-kongreso, IJK, IIK, blindula kongreso kaj Nitobe-simpozio), krom antaŭ-kaj post-kongresaj ekskursoj; kaj (iv) pere de tiu partnereco kun E@I UEA povas aldone pli facile utiligi al siaj membroj la menciitajn eventojn SES, SEP, KAEST kaj Poliglota Kunveno (Poliglota Renkontiĝo) - dum la lasta Virtuala Kongreso la membroj esprimis deziron pri tio.

Kiel finaj rimarkoj pri tiu ŝanĝo la Estraro aldonas, ke la kontraktota partio ankaŭ povas interkonsentote zorgi pri starigo de la jenaj ebloj (neinkluzivitaj en la supre prezentitaj elspezoj):

- a) LKK-retejan sistemon: malgraŭ longtempe antaŭa komitata decido, ĝis nun (kio malhelpas konservado de la historio de la Esperanto-movado) daŭre mankas komuna retejo-sistemo, kiu ebligu al la LKK-oj aperigi bazajn informojn en facila, struktura kaj konservota maniero. Pro manko de tia sistemo, kvankam ĉiujare la LKK-informoj estas preskaŭ la samaj laŭ strukturo, ĉiam ĉiu LKK devas konstrui apartan novan retejon. Sekve la retejoj havas tre malsamajn nomojn, adresojn, foje tre malfacile memoreblaj kaj retroveblaj kaj kies enhavo ne estas konservata kaj poste plene malaperas - kio signifas perdon de valora historia enhavo. Por konservi tian enhavon kaj havi samstilan strukturon por ĉiuj venontaj UK-oj (kio samtempe ŝparos energion, homforton kaj monon al LKK-oj) E@I pretas starigi, ligo kun la respondecoj pri la Kongresa Fako, LKK-retejan sistemon ĉe la adreso <https://uk.esperanto.net>, sub kiu ekzistos unuopaj paĝoj por la jam anoncitaj konkretaj UK-oj laŭ facile memoreblaj adresformatoj kiel <https://uk2022.esperanto.net>, <https://uk2023.esperanto.net> ktp. La sistemo ebligas, ke, se necese, la retejoj povas ankaŭ havi alian oficialan nomon (se la LKK nepre volas/postulas tion) - kaj ĉiukaze la malsamaj adresoj povas reciproke funkcii kiel plusendaj adresoj. Fine tamen ĉio konserviĝus ĉe Esperanto.net, retejo de UEA. Kaj grava avantaĝo de tio estas, ke la LKK-retejo povas esti plurlingva kiel Esperanto.net (kio gravas por informado al neesperantistoj pri niaj UK-oj).
- b) strategio por kaptado de sponsoroj al la UK-oj;
- c) poŝtelefona aplikajo por la kongresanoj (kun diversaj utilaj funkcioj: detala programo de la evento, eblo plani sian kalendaron (vizitindajn/preferatajn programerojn), videbligo de partneroj/sponsoroj, specialaj rabatoj, rekomendoj, mapoj, gravaj anoncoj, anonctabulo, mesaĝoj inter kongresanoj ktp.

Tiu planita ŝanĝo pri restrukturigo de la Kongresa Fako baziĝas ĉefe sur financa aspekto, cele al daŭripovigo de la financa situacio de UEA kaj forigo de la deficitaj laŭ la komitataj decidoj, kvankam ankaŭ antaŭvidiĝas plibonigoj por la okazigo de la UK-oj. La Estraro kune kun la Ĝenerala Direktoro zorgos pri la sekvoj de tiu ŝanĝo al la nunaj laboristoj en Nederlando plene respektive kaj solidare, agnoske al la longtempa deĵorado kaj sindediĉo. La Kongresa Fako jam estis antaŭe informita pri la evoluaj ebloj. La rekomendo estas, ke la definitiva movo devas okazi ankoraŭ en 2021 kaj la kontraktota grupo devas pluzorgi pri la 107-a kaj plene pri la 108-a jam anoncitaj UK-oj. Ĉio tion la Estraro planas fari interkonsiliĝe kun la Ĝenerala Direktoro surbaze de siaj statutaj kompetentecoj kaj responde al la rilataj komitataj rekomendoj.

3.1.2. Pri la Libroservo

Similaj esploroj estis faritaj por la Libroservo. La premisoj de la esploroj estis: (i) la Libroservo restas kiel servo de UEA al siaj membroj kaj al la Esperanto-komunumo; (ii) la Libroservo devas ekzisti en financa ekvilibro; (iii) la movo de la Libroservo devas okazi al loko en kiu tuj disponeblas zorganto(j), tiel ke la Asocio ne estu devigata paralizi la servon; (iv) la movo de la Libroservo kaj ĝia stoko povas iri al aĉetita aŭ luita loko; (v) la movo de la Libroservo devas okazi sen perdo de la strategiaj rilatoj inter Libroservo kaj UK, ĉar la financa rezulto de la Libroservo signife profitas de la UK; (vi) kaj la



movo de la Libroservo devas ligiĝi al grupo, kiu pretas kaj kapablas modernigi la vendretejon de la servo.

El ĉiuj analizitaj ebloj, surbaze de tiuj premisoj, de la rekomendoj de la Komisiono pri Financo subtenataj de la Komitato kaj interkonsiliĝe kun la Ĝenerala Direktoro, la Estraro identigis, ke la Libroservo ankaŭ devas moviĝi al Slovakio sub zorgado de Edukado@Interreto (E@I) serve al UEA.

Rilate financon ekvilibron, en la periodo de la antaŭaj 5 jaroj la Libroservo prezentis netajn enspezojn de 24 555 EUR (2016), 20 453 EUR (2017), 21 339 EUR (2018), 16 024 EUR (2019) kaj 14 795 EUR (2020). Bedaŭrinde en neniu el la referencitaj jaroj tiuj enspezoj sukcesis kovri la administrajn kostojn de la Libroservo en Nederlando, kio inkluzivas salajrojn kaj spacajn kostojn en la CO kaj en stokejoj. La Estraro kaj la Ĝenerala Direktoro komprenas, ke la Libroservo estas grava servo de UEA kaj ke, se necese, ĝi povas esti parte subvenciata kiel servo, sed ĉiuokaze la menciitaj rezultoj estis ĉiam sufiĉe sube la elspezoj de la Asocio pro la Libroservo. Tiusence la negocado kun la indikita kontraktota partio evoluas laŭ la modelo de baza pago plus komplementa partopreno en la rezultoj. La esenco de tiu modelo estas same kiel de la antaŭe prezentita por la Kongresa Fako: ke la taskita grupo estu instigita labori por superi rezultojn. La baza pago por prizorgi la servon do estis fiksita en 12 500 EUR (valoro, kiu estas sub ĉiuj rezultoj de la lastaj 5 jaroj). Sed tiel, kiel okazos la komplementa partopreno, ankoraŭ estas fintraktate.

Tiu movo ankaŭ plenumas la premison, ke la servo ne estu paralizita, ĉar la kontraktota partio disponas pri laborfortoj por tuj pluteni ĝian funkciadon. Rilate lokon, la Estraro esploris pri la ebloj aĉeti aŭ lui lokon en Slovakio por funkciigi la Libroservon kaj gardi ĝian stokon. Kvankam estis identigitaj bonaj ebloj aĉeti spacan en Slovakio, interkonsiliĝe kun la Komisiono pri Financo kaj la Ĝenerala Direktoro la Estraro decidis por unue lui spacan, kiu povas samtempe utili por funkciado de la Libroservo kaj gardado de ĝia stoko. La Estraro identigis taŭgan spacan, kies lupreno kostos ĉ. 900 EUR monate, inkluzive de kurento, gaso kaj aliaj rutinaj kostoj.

La movo al Slovakio devos ankaŭ faciligi la plej bonan funkciadon de la Libroservo dum la UK. La kontraktota grupo laŭinterkonsente garantios modernajn pagmanierojn kaj klientocelajn alirojn, inter ili aranĝon de sendo de aĉetitaj libroj ekde la UK al la hejmo de la kongresano (tiel ke homoj povas aĉeti sen zorgi pri pezo en siaj valizoj) kaj starigo de teamo por surloka konsilado kaj rekomendado de aĉetindaj libroj laŭ la profilo de la kliento, krom strategia konstanta reklamado de la Libroservo kaj de libroj dum la UK. Samtempe estas planata strategia uzo de aliaj eventoj (SES, KAEST, Poliglota Kunveno) por ankaŭ akceli la vendojn de la Libroservo, ne nur dum la UK.

Tiu ŝanĝo de la Libroservo ankaŭ baziĝas ĉefe sur financa aspekto, cele al daŭripovigo de la financa situacio de la Asocio. Post la movo, sekvonta plibonigo devos okazi per modernigo de la vendretejo de la Libroservo. Laŭplane pli moderna vendretejo povas havi adreson kiel <https://katalogo.esperanto.net> - kaj tiumaniere funkcii plurlingve por pli facile proponi librojn al komercantoj aŭ al neesperantistoj entute, krom ligiĝi al la informa retejo de UEA, Esperanto.net. La kontraktota grupo havas laborfortojn kapablajn pri tio zorgi. Pri tio tamen la afero devas esti aparte aranĝita, kio ankoraŭ ne okazis.

Ĉio tion la Estraro planas interkonsiliĝe kun la Ĝenerala Direktoro surbaze de siaj statutaj kompetentecoj kaj responde al la rilataj komitataj rekomendoj. La Estraro kune kun la Ĝenerala Direktoro zorgos pri la sekvoj de tiu ŝanĝo al la nunaj laboristoj en Nederlando koncernaj al la Libroservo, kiuj laŭplane devos akiri novajn konsilajn kaj alitipajn taskojn.

3.2. Modernigo de administrado



La modernigo de la administrado okazas ĉefe pere de la starigo de la Administra Komuna Sistemo Organiza - AKSO. En la unua jarkvarono de 2020 la sistemo pretiĝis por unua testado ("alfatestado"). Faka teamo estis invitita testi. Troviĝis cimoj, kiujn oni korektas. Dum la tuta periodo ĝis nun regule okazas kunsidoj inter la Estraro, la Ĝenerala Direktoro kaj la AKSO-teamo, unufoje semajne aŭ du-semajne. Post korektado de la cimoj devas okazi testado kun oficistoj kaj helpantoj de la oficejaj laboroj. Post tiu testado kaj korektado devas okazi lanĉo de la interfaco kun la publiko. Post tio la Estraro antaŭvidas aldonon de novaj ebloj kaj kapabligo de pli da homoj pri la sistemo. Pro la grandeco kaj komplekseco de la projekto kaj la neantaŭvideblo de cimoj kaj bezonata tempo por korekto, la Estraro preferas ne anonci lanĉo-daton, sed agnoskas la progreson de la laboroj, la zorgan sekvadon de la Ĝenerala Direktoro kaj atentigas, ke tio ne naskas aldonajn kostojn krom la buĝetitaj.

3.3. Disponigo de la sideja domo

La esploroj pri movoj de la Kongresa Fako kaj Libroservo ankaŭ okazas responde al la komitataj rekomendoj por ludono de la oficeja domo en Roterdamo. Dum la esploroj pri tiu ludono UEA ricevis proponon pri aĉeto de la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 (NB176). La oferto estis 1 425 000 EUR por ambaŭ domoj en Roterdamo, t.e. la Centra Oficejo (CO, NB176) kaj la Volontula Domo (VolDom, NB430), aŭ 1 075 000 EUR nur por NB176. Konsultite, la Komisiono pri Financo (kune kun la komisiito pri Financoj, P. Dubourg Glatingny, deflanke de la Estraro, kaj la Ĝenerala Direktoro) pritraktis la demandon kaj, konsiderante (i) la aprobitajn rekomendojn 1, 3, 4, 5, laŭ kiuj pli da laborfortoj estonte estu ekster Nederlando, kun prikonsidero translokigi difinitajn servojn; (ii) la bezonon signife investi en la renovigo de la domo por nur post tio povi lui ĝin tute aŭ parte; (iii) la ĝeneralajn kostojn de la domo; kaj (iv) la pritakson de la domo ricevitan de la Ĝenerala Direktoro pere de profesia makleristo, subtenas la vendon de NB176 por oferto, kiu superu unu milionon da eŭroj. Samtempe la Komisiono rekomendis, okaze de vendo, konkretan planon. Tiu plano ekprezentiĝas ĉi-raporte.

La Estraro subtenas la vendon nur de NB176, kies proponon ĝi taksas nemaltrafebla, aldone al tio, ke post movo de la menciitaj laborfakoj kaj de la Biblioteko Hector Hodler (vd. sube) ne estos finance sencohave teni la domon kaj investi al renovigo por ludono, ko ne portus saman gajnon. La proponinto de la aĉeto akceptis atendi, ke okazu prezento de tio al la Komitato kaj, okaze de decido por la vendo, akceptis rezervi al la Asocio kelkajn monatojn por zorgi pri disponigo de la domo.

Tiu proponata vendo ne signifas, ke UEA ŝanĝos sian sidejon, kiu laŭstatute estas en Roterdamo. Por sideja adreso povos ekuziĝi la teretaĝo de VolDom, kiu estas adreso por komerca/oficeja uzo kaj ĉe kiu povos funkcii la Administra kaj Financa fakoj. Krom tio estas sencohave teni la konstruaĵon kiel posedaĵon de UEA, ĉar, malsame al la CO-domo, VolDom estas finance ekvilibra, donas enspezojn al UEA kaj ĉiuj ĝiaj spacoj estas efike utiligataj. La Estraro ne subtenas ŝanĝon de la sideja urbo de UEA kaj agnoskas la gravecon resti jure ligitaj al Nederlando. Neniu el la planataj ŝanĝoj devas influi pri la sideja situacio kaj pro tio estas grave teni VolDom-on kiel posedaĵon kaj utiligi ĝin por sideja adreso. Tio ankaŭ signifas, ke la plano enkadriĝas en la statutaj kompetentecoj de la Estraro.

Fine, pro la studata movo de la Libroservo, la Estraro devos ankoraŭ analizi la disponigon por luo aŭ vendo de aliaj ejoj de UEA posedataj en Nederlando kaj uzataj nur por stokado de libroj.

3.4. Biblioteko Hector Hodler (BHH)

Sekve de la rekomendoj de la Komisiono pri Financo kaj de la mandato de la Komitato al la Estraro trovi manierojn atingi ekvilibrantan financan estontecon, la Estraro ankaŭ esploris plurajn eblojn por certigi vivipovan estontecon al la Biblioteko Hector Hodler (BHH). Logika sekvo de la vendo aŭ



ludono de NB176 estas la bezono trovi novan hejmon por BHH. Sed ne nur temas pri fizika translokiĝo de la trezoroj, kiuj hejmas en la biblioteko. La manko de konstanta kvalifikita laborforto, la manko de elektronikaj katalogoj kaj ĝenerale la malalta prioritato, kiun la biblioteko ricevis, estas ankaŭ faktoroj, kiuj kondukas la Asocion al trovo de solvo, kiu samtempe kun la fizika gastigado de la materialoj solvas la aliajn problemojn de alireblo, konservado, katalogado, bitigado ktp. Pluraj proponoj kaj ideoj venis al la Estraro, kiu sufiĉe detale kaj dum longa tempo analizis kaj pesis ilin. Neniu el la proponoj solvis ĉiujn problemojn samtempe, sed inter ili elstaris kiel la plej profesia kaj promesplena la propono de la Aŭstria Nacia Biblioteko/Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW), laŭ kiu IEMW transprenos la Asocian Arĥivon kaj de la librojn kaj aliajn materialojn en BHH, kiuj por IEMW ne-duoblaĵoj. Pro tio, post longa prikonsiderado, la Estraro unuanime decidis progresigi tiun proponon. Lige al tio, la spaco luota en Slovakio por la Libroservo utilos ankaŭ kiel (eĉ se portempa) disponejo de la parto de la kolekto de BHH ne transprenota de Vieno.

Sekvis tiun decidon vigla koresponda interŝanĝo inter la komisiito de la Estraro pri Financoj, P. Dubourg Glatigny, la estrarano pri Kulturo kaj Kongresoj, O. Raola, kaj B. Tuidler deflanke de IEMW, ĉefe rilata al la preparo de kontrakta malneto. Laŭ peto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, UEA disigas la originalan malneton de la kontrakto en du partoj (arĥivo kaj presaĵoj). La unua prioritato por pritrakto ricevas la arĥivo. Ankoraŭ farote de la Estraro, gravas decidi kiom longe UEA retenas la dokumentojn antaŭ ol liveri al IEMW (ekzistas propono reteni ilin dudek jarojn kaj post tio liveri al la Muzeo arĥivaĵojn ĉiun kvinan jaron).

Por surloke analizi la fizikan volumenon de materialoj, B. Tuidler vizitos la Centran Oficejon jam fine de aŭgusto. Ĉar li restos nur unu tagon en Roterdamo, la Ĝenerala Direktoro certigos, ke li havos aliron al la Biblioteko kaj ke la Ĝenerala Direktoro aŭ iu de li delegita povos respondi ĉiun bazajn demandojn de B. Tuidler.

Aldone al tiu livero la Estraro planas baldaŭan starigon de *Biblioteko Hector Hodler elektronike* (BHHe). Temas pri retejo por BHH, kiu havos la celon teni la markon de la biblioteko, disponigi elektronikan katalogon de la kolekto, kiu estos daŭre posedata de UEA, krom utili por disponigo de bitaj aŭ bitigitaj materialoj, inkluzive subtene al la agado de aliaj grupoj kaj institucioj, kiel la Centro por Esploro kaj Dokumentado (CED).

Konkludoj kaj resumo

Tiu ĉi raporto celas informi la Komitaton pri la nunaj direkto kaj plano de la Estraro plenumite al ĝiaj instrukcioj de la pasinta jaro. La direkto kaj plano estas bazitaj sur la statutaj kompetentecoj de la Estraro, interkonsile kun la Ĝenerala Direktoro, kiuj bonvenigas komentojn de la Komitato.

La raporto celis esti travidebla por ke la Komitato povu certiĝi, ke tiu plano estas por la dezirataj daŭripovigo kaj progresigo de UEA. Kiel resumo ĝi traktas pri:

1. **(Subvencipetado)** la agado de la Estraro por subvencipetado, bazita sur esploroj kaj provoj ĉe malsamaj subvencidonantoj (inkluzive de malsamaj programoj), kunlabore kun diversaj partneroj, inkluzive kontrakte kun profesia grupo, nome Kosmo Strategio, kaj kun strebo esti utila kaj engaĝi landajn kaj fakajn asociojn (momente nur de Eŭropo);
2. **(Investado)** la laboroj kun la banko kaj vizio de la Estraro, kunlabore kun la Ĝenerala Direktoro kaj la Komisiono pri Financo, laŭ kiu la Asocio devas kalkuli je la konsilado de sperta profesiulo pri investado (G. Evans), preti ŝanĝi sian risiko-profilon, se tio montriĝos necesa, kaj pli investi en nemoveblaĵoj. Pri tiu linio la Estraro petas, ke la Komitato elektu al la Komisiono pri Financo novan membron, nome G. Evans;



3. (Centra Oficejo)

- a. la restrukturigo de la Kongresa Fako, por akiro al UEA de prizorgo de la UK fare de teamo en Slovakio (E@I), kontraŭ administraj kostoj sub la nuna praktiko;
- b. la movo de la Libroservo al Slovakio por plena kunlaboro kun la Kongresa Fako kaj bona uzo de aliaj eventoj favore al la Libroservo, kontraŭ administraj kostoj sub la nuna praktiko kaj kun funkciado en favorpreze luita spaco, kiu ankaŭ utilos por akcepti aliajn materialojn, kiel parto de la kolekto de Biblioteko Hector Hodler, kiu plu posedos UEA;
- c. la transdono de la arĥivo de la Asocio kaj presitaj materialoj (neduoblaĵoj) al Vieno (IEMW) por profesia zorgado fare de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj movo de la parto, kiu restos al UEA, al Slovakio;
- d. la evoluoj de la kunlaboro por AKSO;
- e. la vendo de la oficeja domo, kontraŭ propono, kiu superas unu milionon da EUR, favora al UEA laŭ analizo de profesia makleristo, kio ne signifas movi la sidejon de UEA el Roterdamo, kies nova oficeja adreso povas esti NB430.

La Estraro do proponas:

- i. La Komitato elektas al la Komisiono pri Financo novan membron, nome Garry Evans;
- ii. La Komitato akceptas la Raporton pri agadplano de la Estraro por la financa resanigo de UEA surbaze de siaj instrukcioj.

Siaflanke la Estraro devas denove ĝis la fino de la jaro raporti pri novaj evoluoj kaj prezenti temposkemon por la transiro, kiu devas inkluzivi paŝojn en 2021 kaj 2022 spegule al tio prezentita en tiu ĉi raporto.

Ĉio prezentita baziĝas sur la [rekomendoj](#) de la Komisiono pri Financo por la financa resanigo de la Asocio kaj sur la sekvintaj instrukcioj de la Komitato. UEA dum la du lastaj jardekoj regule suferis pro jaraj deficitaj kaj formanĝo de sia Kapitalo, kun administraj elspezoj ĉiam super la enspezoj de la Asocio pro kotizoj de individuaj membroj kaj ĝenerale super la enspezoj pro ĉiaj kotizoj, kiel raportite en la [aldono al la financa raporto](#). Tio postulas de la Asocio pluan ŝanĝon cele al daŭripovigo kaj tiu ĉi raporto esperas al tio kontribui, kun la celo certigi daŭran agadon de UEA kiel internacia asocio kaj kiel tegmenta organizo de la Esperanto-movado.

FINO



ANEKSE: RESUMA RAPORTO PRI LA KOMITATA ENKETILO RILATE INVESTOPOLITIKON

Ĉi tiu raporto baziĝas sur 30 respondoj al la enketilo sendita al ĉiuj Komitatanoj. Estus utile havi pli da respondoj kaj ankaŭ kompili ĉiujn komentojn, ĉar tiuj donas sufiĉe plenan perspektivon pri la spertoj kaj opinioj de niaj komitatanoj. La Estraro povos poste havigi ĉiujn detalojn en pli ampleksa raporto al la Komitato, se tio estas dezirata.

Por detalaj konkludoj bonvolu legi la Estraran raporton. Pro tio ke la banko ABN AMRO lastatempe proponis mastrumadon de la investoj sampreze kiel la tradician konsiladon, tio estas konsiderinda ĉar plej multaj respondintoj preferis minimume eksterajn konsilantojn por prizorgi la investadon aŭ konsili pri ĝi, kvankam duono estis pretaj doni signifan rolon al la Ĝenerala Direktoro en kunlaboro kun financa aŭ investa komisiono kaj kun konsiloj de bank-investistoj. Tio forprenus personan respondecon kaj eventualajn kritikojn de la gvidantoj de UEA, kaj tiuj kondiĉoj povus speguli la ĝenerale konservemajn kaj ne tro riskemajn sintenojn de la komitatanoj.

Jen respondoj al individuaj demandoj laŭ ordo de prefero por specifa aliro, kun komentoj:

1. Ekvilibro inter stabileco kaj kresko de kapuala valoro - 85% (Stabileco 8%, Kresko 8%)
Necesas egale konsideri parte "modere defendan" aliron kun parte plikreskiga.
2. Ekvilibra kaj fleksebla mikso de akcioj kaj aliaj - 56% (Prudente investu daŭripove 28%)
Ni ne evitu akciojn, sed tiuj ne regu niajn investojn, kaj ni atentu daŭripovajn elektojn.
3. Financa situacio de UEA - necerta 48% (Pozitiva 32%, pesimisma 20%)
Ni devas dependi de profesiaj konsilistoj kunlabore kun niaj reprezentantoj por krei fidon.
4. Kiuj prizorgu ŝanĝojn de investoj - ĜenDir + 2-3 aliaj + eksteruloj 48% (bankkonsiloj 30%)
Respondecu kombino de straranoj, Komisiono pri Financo, Ĝenerala Direktoro, bankkonsilistoj.
5. Difinita ĉiujara enspezo - ne scias 39% (normala 22%, se eblas 22%)
Ne ekzistas forta kialo insisti pri specifa ĉiujara enspezo, ĉar kondiĉoj povas multe vari.
6. Preferinda rezulto de valorŝanĝo - plej konservema 61% (ne celu pli altan enspezon+riskon)
La Komitatanoj estas relative konservemaj, sed parto de la investoj povas esti pli riskemaj.
7. Se okazus 20%-a ŝanĝo de valoro - ege timus-maltrankviliĝus - 43% (eltenu 24%, bone 33%)
Nur malplimulta parto de la kapitalo estu investita pli riske por atingi pli altajn enspezojn.
8. Atendataj estontaj enspezoniveloj - (tre) modera kresko 57% (kresko 24%, ne scias 19%)
La Komitatanoj akceptas moderan kreskon, sed nur kontraŭ modera risko.
9. Tempo por aliro al 95% de kapitalo? 5-15 jaroj 25% (varioj + - egalas, ne scias 38%)
La tuta kapitalo nepre ne estu tuj alirebla por investoŝanĝoj, sed kun atendoperiodo.
10. Persona strategio por kapitalo? Diversaj kontoj 25% (fiksita 20%, elektas individue 25%)
Ekzistas sufiĉe granda diverseco en la komitatanaj decidoj pri personaj investoj.
11. Investo en oro kaj valormetaloj - Jes 24% (ne 9%; ne scias 50%)
Oni povas investi en akcioj, kiuj subtenas valormetalojn, sed rekta investado pli riskas.
12. Kiu prizorgu investojn? Investobankistoj 16% (konsilantoj 47%, investokomitato 37%)
Povas ekzisti investokomitato, sed ili ĉiam havu profesion konsiladon (kiel investobankistoj).
13. Akcepto de heredotaj sumoj kontraŭ dumvivaj elpagoj - jes, esploru, bona ideo 86%
Ni esploru la kondiĉojn por tion aranĝi en Nederlando, ĉu nur por nederlandanoj?
14. Nemoveblaĵoj kun perspektivo de rento super 10% - 36% (ne 9%, ne scias 40%)
Komitatanoj ne certas pri investo en nemoveblaĵoj, kiu povus ne esti facile revendeblaj.
15. Nemoveblaĵoj kun malpli facila revendeblo, sed enspezo super 5% - 83%
Komitatanoj preferas malpli da rento, sed pli facile vendebla konstruaĵo.
16. Investu kun UEA kun persona rento - deziras analizi 60% (jes 35%, ne 5%)
Komitatanoj deziras informiĝi pri la valoro de tia kuninvesto kun UEA.

Kelkaj reprezentaj komentoj:

1. Mi subtenas, ke ni investu pli riske malgrandan onon de la kapitalo. Pri nemoveblaĵoj, indas esplori ĉu sidejoj de E-asocioj ne estas aĉeteblaj. E-asocioj, kiuj luas povas lupagi al UEA.



Ni ŝajne konsentas pri tiunivela risko, ĉar ni perdos monon, se ni nenion riskos. Ni jam komencis esplori pri partnerecoj kun Landaj Asocioj rilate nemoveblaĵojn.

2. Mi pensas, ke la demandoj supraj estas ege bonaj, sed ili rilatas situacion en kiu iu organizo, firmao, asocio estas en stabila epoko. Tio tute ne estas la kazo nun. Strategio en stabila epoko bezonas respondojn al la supraj demandoj. Strategio en fluktua periodo bezonas alian analizon. Tiu lasta analizo devas tuŝi la grandajn alternativojn, kion ni komencas fari nun kun la financa komisiono kaj strategiaj debatoj. Mi pensas, ke nur en stabila periodo, malgranda asocio kiel UEA povas pripensi tiel detale. Kaj ĉi tie mi nur volas reemfazi, ke se estas 20 investoj relative sampartecaj, oni probable neniam PROFITOS per la helpo de financaj fakuloj -- nur se iliaj konsiloj estas senpagaj. Kiam junulo mi sufiĉe bone konis tiun mondon de financaj helpantoj -- multe da merkato, malmulte da rezultoj. Ne fidu, ke ili diras, ke ili gajnos tiom aŭ tiom -- tiuj kiuj havas enajn kontaktojn jes, sed ne normalaj homoj. Ili facile falsigas la rezultojn elektante la komenco-punkton kaj same elektante la fino-punkton.

Ni konsciu, ke tiu perspektivo povas havi sian validecon, tamen aliflanke niaj bankistoj montris al ni la diferencon inter la rezultoj de niaj decidoj (nenion ŝanĝi) kaj la rezulton, se ni estus sekvintaj ilian konsilon. Do ni trovu la sistemon, kiu plej validas por ni. Tio povus esti kombino de parto mastrumata tute de banko, parto mastrumata kun iliaj konsiloj, parto kun konsiloj de aliaj fakuloj.

3. Estu kompenso kontraŭ inflacio per investoj, sed morale defendeblaj. Profesiaj konsilistoj respektu la celojn de UEA.

Jes, gravas, ke oni komprenu, kiuj investoj kongruas kaj kiuj ne. Nia ĉefa banko efektive konsilis kontraŭ investo en Royal Dutch Shell parte pro tio, ke ili influas siajn klientojn al pli daŭripovaj investoj, kio kongruas kun la interesoj de multaj esperantistoj kaj kun movada intereso pri daŭripovo ĝenerale.

4. Grupo de esperantistoj profesiaj pri la afero + ĝenerala direktoro + konsiloj de pagataj profesiuloj. Evidente tiu kombino helpas protekti la kapitalon de UEA kaj provus sproni aliron pli flekseblan, kiu donus pli bonajn rezultojn ol ni vidis ĝis nun.

5. Investu prudente.

6. Investu prudente kaj flekseble por konservi la valoron kaj laŭeble ricevi renton.

Efektive la plimulto de la komitatoj ne malkonsentus kun tiuj rekomendoj.

7. La CO (direktoro), KFA de kompetentuloj, la Estraro, kun daŭra informiĝo kaj konsultado de la komitato.

Kiom dezirus esti engaĝita la Komitato? Aŭ iuj komitatoj kiel konsilgrupo?

8. Investi en akcioj aŭ obligacioj devas okupi malgrandan parton (20-30%) por eviti riskon en perdiĝo de kapitalo, tiu investo devas okazi sub la konsiloj de ekonomiistoj aŭ bankiistoj; tia investo por UEA fakte estas por konkuri kun inflacio kaj eviti la redukton de kapitalo; ĉu ne eblas investi iun kompanion aŭ fabrikan por havi al ni konstantan enspezon?

Certe esplorinda, sed ju pli certa la enspezo, tipe des malpli avantaĝa, se senriska.

9. La propono difini celatan jaran enspezon kaj sekvi investan strategion konforme al tio ŝajnas al mi trafa. Evidente tiu celo devas esti ne tro ambicia -- pri tio ja necesas konsiloj de fakuloj. Sed la lastaj jaroj montris, kiom gravaj povas esti tiaj enspezoj el investoj. UEA uzu antaŭvideblan parton de sia kapitalo, se necese, ĉiun jaron kaj havu ekvilibron en tio. Tio ebligu al la direktoro kaj financaj prizorgantoj longdaŭran perspektivon de 5 jaroj por la plimulto de la kapitalo. Tio forprenu de ni la timon, ke perdo en unu jaro fariĝos eterna damaĝo al niaj kontoj per vendado de akcioj/valorpaperoj je subpremota prezo nur por kovri la elspezojn de la asocio. UEA rajtu investi maksimume 40 elcentojn de sia kapitalo en pli riskaj manieroj (akcioj, REIT, nemoveblaĵoj, valormetaloj); la ceteron oni tenu en valorpaperoj investkvalitaj (almenaŭ BBB laŭ Standard and Poors/Moody's).

Precize tian politikon ni devus ellabori interkonsente kun la Komisiono pri Financo kaj kun partopreno de interesitoj.